BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

PROPRA SIDEJO:

Ed. Jockey Club, sala 103
70.300 - Brasília - DF
Tel.: (061) 226-1298
Caixa Postal 07-1182

CGC Nº
00406 604/0001-06

1887-1987
Centjara jubileo de Esperanto

JUL. - AŬG./1985 N-ro 89 INFORMA BULTENO

# UNUIĜO!

NI PARDONPETAS, KE NI NE TUJ REAGIS AL LA CIRKULEROJ, ENKETOJ, REZOLUCIOJ K.A. VENINTAJ EL DIVERSAJ GRUPOJ KAJ LOKOJ EN NIA LANDO. NI KONFIRMAS NUN, KE NI RESPEKTAS ĈIES SUGESTOJN KAJ KRITIKOJN, KAJ NI KONSIDERAS VALIDAJ ĈIUJN PAŜOJN FARITAJN, SED NI NE REAGIS TUJ NUR ĈAR NI DEVIS PLEJ SERIOZE PRIPENSADI KAJ HAVI LA OPINION DE ĈIUJ ESTRARANOJ ANTAŬ OL ELIRI PUBLIKE KUN NIA OPINIO PRI LA AFERO, KION NI FARIS PER LA BKE-DOKUMENTO N-ro 2 DISDONITA DUM LA NACIA KONGRESO EN BELORIZONTO.

EN TIU DOKUMENTO NI PROFUNDE ANALIZAS LA SITUACION KAJ KLARE DIFINAS LA POZICION **DE LA ESTRARO** KONCERNE LA KRIZON DE LA BRAZILA E-MOVADO, KAJ KIEL SOLVON NI PROPONAS LA KUNFANDIĜON BKE/BEL. MANKAS **LA FINDECIDO DE ĈIUJ MEMBROJ**, SED ĜIN NI HAVOS ĈE LA ĜENERALA KUNSIDO OKAZONTA LA 8an DE NOVEMBRO ĈI-JARE.

SE ANKAŬ BEL-ESTRARO AKCEPTOS LA PROPONON KAJ ĜIA ĜENERALA KUNSIDO ĜIN APROBOS, TIAM NI POVOS JAM EKPAŜI AL LA DEZIRATA UNUIĜO. TAMEN TIO NE ESTOS LA DEFINITIVA SOLVO DE CÎUJ PROBLEMOJ; ĜI ESTOS NUR LA MATERIA, KONKRETA BAZO POR ATINGI LA ĈEFAN PUNKTON: NOVAN STATUTON, NOVAN STRUKTURON DE LA NOVA ASOCIO REZULTONTA EL LA KUNFANDIĜO. SEKVE ONI DEVOS KUNVOKI LA TUTAN BRAZILAN ESPERANTISTARON LAŬ MANIERO PLEJ DEMOKRATIE REPREZENTA, POR DISKUTI KAJ DECIDI PRI TIUJ PUNKTOJ.

FINE, NI ESPERAS – KAJ FAROS ĈION EBLAN – KE ĈE LA KONGRESO EN KURITIBO NI POVOS ANONCI, KE EN BRAZILO NE PLU ESTAS KRIZO, SED LA MOVADO KUN FORTA KAJ MODERNA ORGANIZO JAM MARŜAS AL LA DUA CENTJARO.

---

BALENOJ – SOS. Brazilaj leĝodonantoj devos decidi, ĝis fino/1985, pri balenobuĉadoj en nia lando. Al ĉiu bonkorulo mi petegas, bv petskribi Esperante aŭ nacilingve al "Câmara dos Deputados – Comissão de Extinção da Caça às Baleias – 70.000 = Brasília - DF" – petante decidon favoran al la simpatiaj marbestoj. – G. O. Vaske (95760 - Kaiurbo-RS - Brazilo)

# ŜATOKUPO

G. O. Vaske

Komforte sidas en siaj foteloj dise tra la mondo Radio-amatoroj kaj "kunsidas", ĉiu en sia hejmo. Ili anksie atendas la minuton kiam eblas reekaŭdi geamikojn. Vere internacia rondo okazas jam de pluraj jaroj per la alnomata VERDA-RONDO. Ĝi okazas ĉiusabate kaj dimanĉe je la horo 20,30 UTC (kodo ĵus aprobita anst. GMT) sur la frekvenco 14.266 Khc. Delonge konsistigas ĝin jenaj radio-kolegoj: Juan, el Bonaero, la plej fidela rondano, kun sia edzino Susi — Lenjo, el Laĵeado — Vaske, el Kaiurbo — Pedro, el Kuritiba — Tito, el San-Roke — Enivaldo, el Braziljo, brazila ILERA-reprezentanto — Jason, el J. Pessoa — Sitonio, el Recife — Velozo, el Bona-Espero — Zeluis, el ŝipo ie sur Atlantiko — kolegoj el Francio, Germanio, Hispanio, Israelo, Usono k Sovetio, kiam ondodisvastiĝo favoras. Krome kalkuleblas pluraj "strigumantoj" (kiuj nur aŭskultas) ĉu pro kuraĝomanko enmiksiĝi en la paroladojn ĉu pro tio ke ili estas B — aŭ C-klasanoj. Aliaj strigumas per nura ricevilo. Tiaj meritas blinde dissenditan saluton, Kompreneble ne ĉiam ĉeestas ĉiuj rondanoj. Tiam pike aŭdiĝas ke X-forestanto ĉasas papiliojn... surtrotuare!

Pro manko de pli granda nombro da E-kolegoj la hobio estas ege invadita de neesperantaj mallongigoj tamen oportunaj, ĉefe en telegrafia uzado. Jen kelkaj: Ĉi tie = HR — Ĉirkaŭ = ABT — Ĝis revido/reaŭdo = GB — Kara amiko = DR OM — Vi = U — Ĉirkaŭbrakojn = 73 - Kisojn = 88. Nerare R-amatoro gastigas samideano(j)n. Tiam por novuloj estiĝas bonŝanco alparoli ĉiujn rondanojn. Tiaj ekster rutinaj rondoj fariĝas speciale interesaj. Okazas ŝercoj, primokoj, gagoj, drole spicitaj diraĵoj trafe adresitaj. Ofte konstateblas, pro perfidaj bruetoj, ke la rondon "spionas" neesperantistoj. Pluraj el ili atendas oportunon manifestiĝi favoraj al internacia lingvo. Tiel prezentiĝas okazo iomete propagandi pri nia verda idealo. Oni mencias adresojn kaj informas ke ĉiutage aŭskulteblas RP, je la 22,30 UTC laŭ 9820 k 11, 515, khc, en ĉi-sezono.

En la 40-metra bendo aktivas B-klasanoj; en 80m la C-klasanoj, la komencantoj. Akiri C-klasanecon estas pli facile ol priŝteli blindulon; nebezone telegrafio nek radio-tekniko. Enlande konstruitaj R-aparatoj akireblas laŭ parcelogapoj. La nunaj, modernaj, funkcias preskaŭ magie. Frekvenca agordo plenumiĝas rapide. Ĝia mikrofono posedas reguligan sistemon nomata VOĈ (vox). Kiam ĝi estas alĝustigita sufiĉas flue paroli, sen ŝalti/malŝalti, kaj samtempe enaŭskulti ĉu iu el la rondanoj enpafis respondon/demandon/kontraŭdiron. La sama sistemo funkcias ankaŭ en telegrafia uzado. Infanvoko aŭ nevole kaŭzita bruo funkciigas la VOĈ-sistemon. Tiaj nevolaj enmiksiĝoj ebligas konstati la ĉeeston de silentaj "ĉirkaŭstarantoj".

Kion vi atendas, kara leganto? Ĉu akiri fremdlandan mirindaĵon??... tion faru pli poste, kiam vi fariĝis A-klasano. Kaj, kuraĝiga konsolo: la investita mono konserviĝas altvalora, kiel en ŝparkaso.

# *El nia tirkesto*

- Kiel rezulto de la integriĝa laboro de NEK, fariĝas pli oftaj la informoj inter BEL/BKE/KKE; tial la Ligo disponigis al ni sian adresaron, kiun ni kontrolas kun la nia. El tio estas jam tre interesa konkludo nome: koncerne ĝiajn anojn kaj la niajn la plimulto ne koincidas kaj tiel ni povos atingi pli ol 800 nomoj. Same pri aliaj adresoj (iamaj anoj kaj simpatiantoj) entute pli ol 5000.
- Nin vizitis: urugvaja junulo kiu interesiĝas pri E-o dank' al la aktivado de s-rino Eliane Barrocas; Jozefo Delpino, malnova usona espisto, kiu interesiĝas loĝi definitive en Brazilo.
- Nia prezidanto vojaĝis plurfoje al Belorizonto dum la preparado de la nacia kongreso kaj ankaŭ al aliaj urboj en ŝtato Minasĝerajso: Ipatinga, Pedro Leopoldo. En Rio-de-Ĵanejro li partoprenis NEK-kunsidojn kun Kol. Fernando Marinho kaj D-ro Dilermando Castro, prezidantoj de BEL kaj KKE.
- BKE-Dokmentoj N-ro 1 (Kiel fondi E-grupojn) kaj N-ro 2 (Pri la Brazila Movado) estis dissenditaj al ĉiuj membroj kategorio A kaj B, kaj ankaŭ kompleze al aliaj E-societoj. Baldaŭ aperos la N-ro 3 (Pri E-instruado en lernejoj kaj preparado de instruistoj).


## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

**Honoraj Prezidantoj**

**Francisco de Souza Almada (Av. Bern. de Campos, 624 Ap. 72, BR 11100 - Santos-SP)**
**Carlos A. S. da Cunha (Alameda dos Maruás 471, BR 04068 - S. Paulo-SP)**

**Estraro (1985/87)**

**Prezidanto - Nelson Pereira de Souza**
**Tel.: 242-5211 (061)**
**Vicprezidanto - Elvira Fontes (Caixa Postal 5.888, CEP 01000 - S. Paulo-SP)**
**Sekretario - Ludimar Azevedo da Silva**
**Tel.: 562-8904 (061)**
**Kasisto - José Carlos Dorini Ramos**
**Tel.: 577-2214 (061)**
**Kulturaj Aferoj - Dro Paulo Vieira da Silva**
**Tel.: 553-1365 (061)**

**Informa Bulteno**

**Ricevas ĝin senpage la Membroj kaj ĉiu, kiu faras donacon almenaŭ unufoje en la jaro.**
**Ĉefredaktoro**
**Nelson P. de Souza**

**Kunlaboraĵoj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.**

## 55-a Soneto por Nejma



Do,
ja
da
tro...

– Ha
lo?
– Ho
la...

– Ĉu
nun?
– Hu!!!

Li
kun
ŝi.

*La 54-an soneton tradukis Geraldo Mattos. 10.03.85*

## REZOLUCIO DE LA 21-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La plenkunsido de la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto, aŭskultinte la partoprenantojn en la diversaj kunsidoj kaj observinte la rezultojn de la eksteraj manifestacioj, konstatas:

1) ke ĉi tiu kongreso plene sukcesis koncerne la temon: "Survoje al la Jubilea Centjaro – Esperanto sur la stratoj";

2) Ke iom post iom niaj kongresoj fariĝas vera forumo de la brazila esperantistaro;

3) ke la Brazila Esperanto-Movado evoluas cele al la dezirata unuiĝo.

Sekve ĝi decidas rekomendi, ke ĉiam en estontaj (ĉu naciaj aŭ regionaj) eventoj oni ne nur uzu nian potencialon por la efektiva aplikado de la demokratia sistemo, sed ankaŭ oni montru al la neesperantista publiko la uzeblecon de Esperanto kaj la forton de nia Movado.

Belo Horizonte, la 21-an de Julio 1985.

# Granda Sukceso!

Entute 608 aliĝintoj el 18 brazilaj ŝtatoj kaj unu el Usono. Jen la ciferoj kiuj ebligas al ni aserti ke la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Belo Horizonte de la 17-a ĝis la 21-a de Julio, estis unu el la plej grandaj naciaj E-kongresoj en Brazilo. Belo Horizonte estas la tria plej granda urbo de la lando, kun 1.500.000 da enloĝantoj. La kongreson organizis Belorizonta Esperanto-Asocio (st. Carijós, 141 s.807 - 30.000 Belo Horizonte-MG) kiu ĉefa sukceso estis la grandega atento, kiun la amaskomunikiloj direktis al la evento.



La grandioza marŝo kiu trairis la urbon Belo Horizonte dum la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Antaŭ la malfermo okazis la gazetara intervjuo, en kiu partoprenis pluraj TV-, radio-stacioj kaj ĵurnaloj.

Dum la malferma solenaĵo, Prof-ro Wilson Chaves, reprezentanto de Lia Ŝtatestra Moŝto, portugallingve salutis la ĉeestantojn, kaj finis sian paroladon per esperantaj sentencoj.

La solenaĵon sekvis arta programo. Okazis la antaŭlanĉo de disketo, unuafoje en la mondo, kun Brazila Populara Muziko originale komponita en Esperanto. Sin prezentis Flávio Fonseca (Flavju Fonseka), aŭtoro de la muzikoj kun sia grupo. La disko celas festi kaj disvastigi la Centjariĝon de Esperanto. Interesatoj povas ĝin mendi al Esperanto-Asocio de Brasília, Caixa Postal 11-1124, 70.084 Brasília (DF).

Ankaŭ la Teatro-koruso de Fakultato pri Ekonomikaj Sciencoj de U.F.M.G. surscenigis belegan spektaklon.

La ĵurnalisto Afonso Romano publikigis en "Jornal do Brasil", unu el la plej legataj periodaĵoj en tiu lando: "Scipovi unu fremdan lingvon, signifas la rompon de unu baro. Scipovi kelkajn lingvojn, signifas la rompon de pluraj baroj. Scipovi Esperanton, signifas la volon rompi ĉiujn barojn samtempe". La urbaj ĵurnaloj kaj radio-stacioj multe informis pri la kongreso. TV-GLOBO kaj TV-MANCHETE, la plej gravaj TV-stacioj tie, elsendis al la tuta lando kaj programerojn kaj la marŝadon kiu trairis la urbocentron, ekde la kongresejo ĝis Placo Zamenhof (ĉirkaŭ 3 km malproksime). Sur la monumenton, starigita omaĝe al la 12-a Brazilia Kongreso de E-o en 1949, oni fiksis memoraĵ-plakon.

La libroservo perfekte funkciis kaj multege vendis. Estis lanĉataj libroj pri Filozofio kaj poezio. Inter ili elstaris tiuj de akademiano Geraldo Mattos (La Libroj De Nejma k. De Adoro), kiu faris lingvajn eksperimentojn en siaj libroj, verkante eĉ en Pra-Esperanto kaj interpunkcie. Leopoldo Knoedt, internacie konata literatura kritikisto, ilin prefacis tiel: "Vulkano, fakte ĉiam nur modere aktiva, post 18 jaroj da ripozo subite eksplodis. Tiun elŝprucadon de raketsimilaj artfajraĵoj de 124 sonetoj en la rekorda tempo de 33 tagoj oni ne povas ne nomi violenta eks-

plodo. Ankaŭ alimaniere la verkaro riĉigas nian erotikan literaturon ... "

Ligite al la kongresa temo – SURVOJE AL LA CENTJARIĜO: ESPERANTO SUR LA STRATOJ – oni spektis kelkajn prelegojn kaj debatojn. Krome, oni prezentis prelegon pri Arto, Astrologio, Medicino, Stomatologio, Instruado, Libr-e ldonado, k c. Okazis ankaŭ fruktodonaj diskutoj pri la ĝnerala situacio de la landa movado.

Multe plaĉis al la publiko, la kurso por komencantoj de Sylla Chaves, kaj la kurso por E-instruistoj de Prof-ro Geraldo Mattos.

Menciindas ankaŭ la Arta, Turisma kaj Medicina Ekspozicioj, ege vizititaj.

La distra parto konsistis el serenado ĉe Placo Zamenhof, turismaj vizitoj al historiaj urboj de ŝtato Minas-Ĝerajso kaj en la lasta vespero, la Balo Verda-Blanka, en kiu ĉiuj vestitaj laŭ tiuj ĉi koloroj dancadis kaj amuziĝis.

Kiel kutime, antaŭ la solena fermo, estis la Sankta Meso en Esperanto.

La venontjara nacia kongreso okazos en Kuritibo, kaj en 1987 en urbo Rio-de-Ĵanejro.

---

## *TOSTO AL LA KONGRESO*

*La horizonto estas bela! Floro*
*kaj frukto, amo kaj decido flua*
*fariĝas la certeco pri la gloro*
*kiu naskiĝos tie ĉi, kongrua!*

*La sinceran ni ĝuas harmonion*
*por la kunsidoj trafaj de l' Kongreso*
*kies varba laboro utopion*
*venkas kaj marŝas rekte al progreso*

*ĉar batalantoj ja por la Centjaro*
*bezonas ni rikolton. Ĝi prosperas*
*per agado de frata kolegaro*
*antaŭ kiu eĉ krizoj malaperas...*

*Jen Zamenhof ridetas el ĉielo,*
*nia Majstro, lumturo, nia fonto:*
*lia rigardo havas pli da helo*
*pli da feliĉo pro Belorizonto!*

JORGE DAS NEVES

Al la 21-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO



### NIA FAMILIO "KRESKEGAS"

### KATEGORIO "C"

Hermes Pereira Dourado - GO
Jason Gonçalves de Lima - PB
Joel Afonso Francisco - SP
Maria Cecilia C. N. Vieira - RJ
Silvestre Bego - MG
Manoel Emygdio Silva - DF
Áurea Toledo Piza - DF
Sila Bastian Costa - SC
Maria Eunice M. Silva - DF
Constâncio P. Fonseca - DF




### MONDONACOJ ESTAS BONVENAJ!

| | |
|---|---|
| Áurea T. Piza-DF | 10.000 |
| Othon B. Baena-RJ | 5.000 |
| Marcelo V. Andrade - MG | 10.000 |
| Ricardo F. C. França-DF | 10.000 |
| Francisco/Maria Almada-SP | 100.000 |
| Maria Luiza Bilot-RJ | 5.000 |
| Joel Maciel Soares-RJ | 5.000 |
| Joaquim P. Codeço-RJ | 10.000 |
| Nelson P. Souza-DF | 46.500 |
| Flavio Miranda-DF | 50.000 |
| Delma T. Carvalho-MG | 5.000 |
| M. Eunice M. Silva-DF | 90.000 |
| Modesto B. Abreu-RS | 20.000 |
| Hugo Foscolo-MG | 10.000 |

# BRAZILAJ NOVAĴOJ



*BAHIO (BA)*

★ *O MARAUENSE publikigis interesan artikolon pri la poresperanta agado de Prof. Eléus L. Sá en la tuta ŝtato.*

*FEDERACIA DISTRIKTO (DF)*

★ *E-ASOCIO DE BRASILIA (C. Postal 11-1124 – 70084 Brasilia-DF) organizis Kulturan Semajnon (22a/28a de julio), kiu fariĝis vera post-kongreso kun prelegoj, kurso pri La Arto Traduki gvidita de D-ro Leopoldo Knoedt, kaj Kolokvo pri la Brazila Movado. Partoprenis geesperantistoj el diversaj urboj kaj ŝtatoj.*

★ *EAB ankaŭ iniciatas la lanĉon de disko "Flavio Fonseca en E-o" kun ties originalaj muzikaĵoj kaj la tradukita MI AMOS ĈIAM VIN de Tom Jobim/Vinicius Moraes.*

*MINASĜERAJSO*

★ *S-rino EDINA DE BARROS REIS (Av. Dr. Jacinto Soares Souza Lima, 90 – 36500 Ubá-MG) aktivas por la revigligo de la tiea movado; tial ŝi invitas BKE organizi kursojn kaj prelegojn tie en novembro.*

*PARANAO (PR)*

★ *Paraná E-Asocio (C. Postal 1701 – 80000 Curitiba-PR) jam faris al NEK skriban proponon okazigi la 22an Nacian Kongreson de la 16a ĝis la 20a de julio 1986. Kompreneble ĝi estas akceptita kaj la provizora Loka Organiza Komitato estas: Prez. Geraldo Mattos; Sekr. Espedita Feitosa; H. Sekr. Nidia Sampaio; Kas. Salvador Raimundo; H. Kas. Geraldo Boz Jr., kiu baldaŭ dissendos la aliĝilojn.*

*RIO-DE-ĴANEJRO (RJ)*


★ *BB-MOVADO – ĉe s-ro Ruy C. Albuquerque (Av. Rio Branco, 65 s/1112 – a0090 R. Janeiro-RJ) informas ke portempe ĉesos aperigi PIB-Bultenon, "ĝis pli efektiva kunlaboro de la oficistaro de Banko de Brazilo."*

★ *De D-ro Joaquim do Couro (Niteroi E-Klubo, C. Postal 10, 24000 Niteroi-RJ) ni ricevis donace la libron pri la XV Brazila Kongreso tie okazinta en 1957. Dankon!*

*SAN-PAŬLO (SP)*

★ *Soc. Bauruense de E. (C. Postal 63 – 17.100 Bauru-SP) prezentas sian jaran bilancon kun tre laŭdindaj rezultoj. Gratulon!*

★ *Brazila Esperantista Katolika Organizo (C. Postal 234 – 18100 Sorocaba-SP) diskonigas sian jaran raporton kaj daŭre publikigas Brazilan Katolikon. Plezure*



Prof-ro Leopoldo Knoedt gvidis Kurson pri la Arto Traduki en/el Esperanto(n), dum Kultura Semajno de Esperanto-Asocio de Brasília en kiu partoprenis 23 personoj el 8 ŝtatoj
Fotis: Roberto Resende

*ni konstatas ke tiu faka movado (unu el la plej malnovaj) revigliĝas en Brazilo, kaj ni esperas ke ĉiuj apogos ĝin.*

*SANKTA-KATARINO (SC)*

★ *Prof. EVALDO PAULI, ĵus veninta el Eŭropo, kie li paroprenis la kongresojn en Metz kaj Augsburg, jam preparas forumon pri "fakaj asocioj" por la venonta kongreso en Kuritibo.*

*SUDA MATOGROSO (MS)*

★ *Organizota de União Municipal Espíria kun apogo de Federação Espírita do Mato Grosso do Sul, s-anino MARIA GARCIA (Rua 15 de Novembro, 230/55 – 79100 Campo Grande-MS) preparas Semajnon Esperantistan Spiritistan, kiu okazos en la 21a/29a septembro kun prelegoj kaj baza kurso.*

# "TAGO DE LA PACO"

En 1985 ni, japanoj, havos la 40-ajn datrevenojn de la malsaĝo de la homaro, la atombombaj tragedioj de Hirosima kaj Nagasaki, kaj plie la 70-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) enhavos la datojn mem, la 6-an de aŭgusto por Hirosima kaj la 9-an de aŭgusto por Nagasaki.

Lastatempe en Japanio oni pli objektive analizas la okazintaĵojn kaj iliajn postefikojn. Nun ni klare komprenas ke japanoj, la popolo de la sola lando viktimigita de la praktikaj uzoj de nukleaj armiloj, devas laŭte informi la mondon pri la fakto ke la malbono de atombombo, kaj de ĉiuspecaj nukleaj armiloj, estas ne simple en ĝia grandega difekto-povo de la momento, sed ĉefe kaj grave en ĝia postefiko daŭre restanta en la korpo de la viktimoj.

Per la prezento de la faktoj de Hirosima-Nagasaki ni deziras apeli al la tuta mondo: DO, NI DEVAS PREVENTI ĈIUSPECAJN MILITOJN por ne ripeti la malsaĝon de la homaro.

Pro tio Universala Esperanto-Asocio (UEA), la organizanto de la UK, bonvolas havigi al ni ŝancon apeli la deziron de japanoj por la PACO. Japana Esperanto-Instituto(JEI) akceptis la proponon kaj prezentis konkretajn planojn. El tio jenojn ni efektivigos kiel programerojn de la 70-a UK en Augsburg.

Por la entrepreno jam promesite estas kunlaboroj de organizaĵoj kaj individuoj en diversaj landoj.

**LA PLANOJ**

**1. broŝuro**

**aspekto**: A5-formate 8-paĝoj

**lingvo**: originale en Esperanto por povi libere traduki en diversajn lingvojn

**enhavo** (plano):

- ĝenerale pri la okazintaĵoj en Hirosima-Nagasaki
- kvalita graveco de postefiko de atombombo
- kiel nun statas la viktimoj en Hirosima-Nagasaki kaj en aliaj mondo-partoj
- kiel nun statas nukleaj armiloj en la mondo
- ni devas preventi ĉiuspecajn militojn
- listo de en-esperantaj libroj eldonitaj en Japanio kun la temoj pri atombombo, kontraŭ-milito, paco ktp.
- rekomendo traduki ĉi tiun broŝuron en diversajn lingvojn
- listo de japanaj Esperanto-grupoj por la temoj
- grafikaĵoj

**distribuo**: al ĉiuj kongresanoj tra la kongresa dokumentujo

**eldonkvanto**: 10000 (2500 por UK)

**2. ekspozicio**

**loko**: ie en la kongresejo

**lingvo**: Esperanto(eventuale ankaŭ la germana)

**enhavo**: bazita sur la fotoj (nekoloraj) en la libro "HIROSIMA-NAGASAKI"

**skalo**: maksimume 70, minimume 10, paneloj (70x90cm)

**3. librovendado**

**loko**: certa angulo en la kongresa libroservo

**vendaĵoj**: en-esperantaj libroj kaj aliaj objektoj eldonitaj en Japanio kun la temoj pri atombombo, kontraŭmilito, paco ktp.

**vendistoj**: japanoj-kongresanoj

**4. kunveno – – –**

**TAGO DE LA PACO**

**tago k horo**: la 5-an de aŭgusto (lundo) 16:30--18:00

**formo**: se eblus, publike ankaŭ por ne-esperantistoj
**lingvo**: Esperanto(eventuale ankaŭ la germana)
**enhavo**(plano):
-- raportoj el diversaj landoj
-- prelego
-- diskuto (eventuale)
-- publikigo de "apelo"
**prezidisto**: s-ro UMEDA Yosimi

5. **filmprezento**
**tako k horo**: la 6-an de aŭgusto (mardo) 10:00--13:00 enkadre de la programero "Filmoj"
**enhavo**: dokumento pri Hirosima-Nagasaki "YOGEN" (kolora, 43 minutoj) aŭ "NINGEN O KAESE" (kolora, 20 minutoj)
**alia**: klopodote estas aranĝi en-esperantan komentadon

6. **aliaj**
-- la kongreso nomos la 5-an de aŭgusto "Tago de la Paco", dum la 6-an "Tago de la Lernejo", la 7-an "Tago de la virinoj"
-- en la unua Ĝenerala Kunsido la Prezidanto en sia enkonduko prezentos la aferon
-- en la kunveno "Agado ĉe UNO" pritraktos ankaŭ tiun temon

**NI ATENDAS KUNLABORON**

**de ĉiuj pacamantoj** -- Bezonata estas kapitalo, 200.000enoj, por la entrepreno. Atendata estas via financa helpo. Bonvolu sendi al JEI (pĝk:Tôkyo 3-11325) vian donacon kun indiko "Tago de la Paco".

**de libroeldonintoj pri la temoj**-- Ĉu vi bonvolus donaci kelkajn ekzemplerojn da via eldonaĵo al la entrepeno? Ni vendos ilin en la UK kaj gajnos kapitalon.

**de pacmovadgrupoj**-- Ĉu vi bonvolus partopreni en la postzorgo de ĉi tiu entrepreno? Se jes, bonvolu sinanonci kun informo pri via agado antaŭ ol julio 15. Eventuale listigos en la broŝuro.

**de UK–partoprenantoj**-- Ĉu vi bonvolus disponi 1-2 horojn dum la UK kaj deĵori ĉe la libroservo?.

**ANTAŬDANKOJN!**

*******************************

Se vi havas demandon pri ĉi tiu plano, bonvolu turni vin al la Internacia Fako de Japana E-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyu-Ku, Tokio 162, Japanio.

---

## KVAR ELDONEJOJ

Krom la de ĉiuj konataj: BRAZILA ESPERANTO–LIGO (Praça da República, 54/2º – 20211 R.Janeiro–RJ) kaj KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ (Av. 13 de Maio, 47 s/loja 208 – 20031 R.Janeiro–RJ), estas en Brazilo aliaj kvar eldonejoj regule prezentantaj novajn librojn al la esperantistaro:

*BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO (Rua Souza Valente, 17 – 20941 R.Janeiro–RJ) jam eldonis ĉirkaŭ 30 titolojn kaj jam reeldonas kelkajn, el kiuj Primeiro Manual de Esperanto estas la plej vendata: pli ol cent mil ekzempleroj.

*FONTO (C. Postal 49 – 89800 Chapecó–SC) – krom la beletra revuo sammnoma kaj la filozofia revuo Simpozio, eldonis gravajn lego/lernolibrojn (Gerda Malaperis, Facila Skeĉ-Albumo k.a.) kaj belajn literaturaĵojn (La Luzidoj, La Libro de Nejma k.a.).

*SOCIETO LORENZ (C. Postal 3133 – 20001 R. Janeiro–RJ) publikigas ĉiujare Almanakon Lorenz kaj diversajn spiritualismajn verkojn (ekzemple de Lorenz, Huberto Rohden, Nassif Isaac k.a.).

*LABORGRUPO ANTAŬEN (C. Postal 07-1055 – 70000 Brasilia–DF) eldonas serion "Brazilaj Kajeroj" kaj diversaĵojn, ekz. Kristnaskaj leteretoj, korespondkartoj.

GRAVA AFERO: ĈIU ESPERANTISTO DEVAS AĈETI PLI DA LIBROJ KAJ HELPI LA ELDONADON DE NOVAJ VERKOJ!